

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorietta de Bilbao, 5.

Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II^a
JARO

NUM. V.^a—MAJO, 1929

II^a
JARO



Asturias.—Fraŭlinetoj tipe vestitaj.

POR LA INSTITUTANOJ KAJ ESPERANTO-KURSGVIDANTOJ

Ju pli Hispana Esperanto-Asocio progresas, des pli nia Instituto graviĝas ĉar sekvo de la progreso estas fondiĝo de novaj Grupoj kaj malfermo de novaj kursoj, krom la jam malfermitaj de antaŭe, kiujn ja oni povas juĝi konstantaj, fariĝante same la plej granda parto el la novaj post kelke da tempo. La kursoj entute estas kvazaŭ disigata Esperanto-Lernejo, la plej firma kaj konvinkanta argumento por ke la Ministro de Publika Instruado interesiĝu pri nia celo; ĉi tiu lernejo, ĝia funkciado kaj ĝiaj rezultoj, aperas ĉefe sur la ĉiujara raporto al lia ministra Moŝto por trafi lian atenton kaj decidi lin al helpo por nia afero, rimarkigante la disdonadon de Elementaj kaj Superaj Atestoj pri Esperanto-Kapableco, la ĵusan eldonadon de la Demandaro kaj Respondaro por unuigi la instruadon de la elementa kurso; rimarkigante ke saman gvidilon la Instituto preparas por la superaj kursoj. Sed ĉi tio ne sufiĉas; estas nepre necese, ke la kurso-gvidantoj interesiĝu por ke la lernantoj akiru la Demandaro-Respondaron, por ke la lernantoj sin decidu esti ekzamenotaj laŭ tiuj normoj kaj havigu al si la atestojn koncernatajn de la ekzameno. Kaj ne nur la kurso-gvidantoj, eĉ la membroj de la Instituto nepre devas instigi al la ekzamenoj kaj prezidi la tribunalojn, ĉiam atentante tion, kion mi diras je la komenco kaj ke la Instituto estas kvazaŭ teknika fako de H. E. A. kun celo progresigi kaj graviĝi nian Asocion. Krom tio oni devas konsciigi al la lernantoj por pli bone konvinki ilin al ekzamenoj, ke la Atesto pri Esperanto-Kapableco estas OFICIALA MERITO laŭ la Reĝa Ordonado de la Ministerio de Publika Instruado, publikigata de la Madrida Gazeto num.º 227ª, la 15ª de Aŭgusto de la jaro 1911ª, kiu povas havigi profiton iam. Oni devas atenti bone, ke la Atesto Elementa koncernas nur la scipovon paroli kaj skribi la lingvon por kutima ĝenerala interkompreniĝo, ne atentante apenaŭ la gramatikaĵojn.

Nu; tial ke baldaŭ finiĝos la kursoj nuntempaj, mi insistas instigante al ekzamenoj kaj ankaŭ atentigas, ke izolaj esperantistoj povas esti ekzamenotaj per korespondaĵoj. Ĉi tiuj sin turnu al mi petante klarigojn (Abascal, 13, pral. A., Madrid). Esperable estos, do, la okazigo de ekzamenoj en ĉiuj lokoj.

Pastro *Mariano Mojado*, Prezidanto de H. E. I.

PROJEKTO

pri kiel eble plej simpla organizado de la Tutmonda
Esperantistaro

(Daŭrigo)

ANTAŬKLARIGOJ

Ĉi tiu gazeto celis aperigi la du projektojn premiitajn de la Kongreso de Sevilla, sed unue tiun de S-ro Anglada, kiu atingis la 1^{an} PREMION, tamen hazarde oni donis al la presejo tiun de S-ro Aleksandro Siitam, el Tailinn, kaj ni ĝojas estu okazinta la hazardaĵo, ĉar ni tial povos aperigi tiun de S-ro Ang'ada sur unu sola numero kaj la publiko plibone juĝos la tuton post la legado de la iom komplika de S-ro Siitam, konsciante a gravecon de la unue premiita pro ĝia kompleteco kaj simpleco. Jen la projekto de S-ro Anglada, el Barcelona:

PROJEKTO POR ORGANIZADO DE LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

(Devizo) *Lemo*: Per bona organizo rapidigu la finvenkon.

RIMARKO

Ne estante la Esperantismo afero de hodiaŭ kaj posedante nun jam la Esperantistaro sian propran organizon, decas tie ĉi nun trakti pri ĝiaj ĉefaj forigindaj mankoj, ĉar la afero ne estas komence krei organizmaĵaron novan, sed reorganize plibonigi la jam ekzistantan. Anstataŭ rompo kaj rekonstruo, ni preferis ĉiam la evoluon, t. e., la konservado kaj plibonigado de tio, kio jam funkcias.

La nun ekzistanta organizo estas formata de diversaj asocioj (lokaj, regionaj, naciaj, universala), kiuj, ricevante ĉiuj senpere la kotizojn kaj kunhelpon de la individuoj, kvazaŭ konkuras unu kun la alia. kaŭzante gravan perdon de energio kaj rimedoj, kaj tial ne rapidigante la progreson de Esperanto tiel, kiel estas necese.

I.—ENKONDUKO

Unu el la ĉefaj aferoj por plirapide progresigi la Esperantis-tan Movadon estas sendube la bona organizo, kiu ŝparas labo-

ron kaj akirigas monajn rimedojn, gravaj aĵoj por atingi forton.

Organizo signifas kaj postulas unuiĝon. Sen unuiĝo, organizo estas neebla. Se eĉ ekzistas multaj Esperantistoj, aparte aŭ individue ili malmulte povos fari. Unuiĝo estas necesa ankaŭ, ne nur por grandigi la propagandon, sed por igi ĝin pli konstanta; same kiel konstanteco en la propagando estas necesa por igi ĝin pli efika.

Ĉi sekve estas prezentata skemo, kiu, ni kredas, povas bone kontribui al la plirapida progresigo de la Tutmonda Esperantista Movado, kaj konduki al la baldaŭa plena triumfo de nia afero.

Vi vidos, ke nia internacia organizaĵo, U. E. A., restas la sama; nur estas la detaloj, kiuj aliĝas, sed tiuj detaloj, laŭ nia opinio estas tiel gravaj, ke de ilia nezorgado aŭ zorgado dependas: aŭ la senfina malrapida progresado, ĉiam proksimiganta nin al celo neniam atingebla praktike, aŭ la akcelo de nia movado, kiu kondukos nin reale al la atingo de nia venko.

II.—KIEL NI DEVAS AGI

Kiel por la konstruado de domo, por la starigado de regula organizo, oni devas prikonsideri komence la fundamenton kaj la konstruajn partojn (tion ĉi antaŭ la tuto). Ni devas komenci per la individuo, kaj laŭgrade daurigi per la ceteraj elementoj de la plenperfekta unuiĝo. Tiuj elementoj estas: a) la individuo; b) la loka societo aŭ grupo (individuaro); c) la regiona federacio (societaro); ĉ) la nacia konfederacio aŭ asocio (federaciaro); kaj d) la universala organizaĵo (I. C. K., C. O., U. E. A., K. K. K., K. R.) kaj la lingvaj institucioj (L. K. kaj Akademio) kaj fondota Universala Spesmila Banko.

Iniciatado de la loka societo.

Komisiono de Esperantistoj vizitos la samideanojn kaj simpatiantojn, precipe gravajn personojn, petante ilian moralan kaj materialan ĉiumonatan helpon (grandaj kotizoj ne estu akceptataj, ĉar ili ne povas esti konstantaj) por la fondata aŭ reorganizata Esperantista Societo.

Aranĝo.

La loka societo klopodos havi tuj kiam eble enspeziston-varbanton kaj sekretariojn pagatajn, kaj poste propran sidejon. Kiel

firmigilon la societo kreos diversajn servojn, starigante laŭ eblo utilajn kaj amuzajn fakojn, kursojn de ĝenerala instruo kaj eduko, k. t. p.

Ĉiu elemento (individuo, societo aŭ societaro) pagos al sia plejproksima supera organismo parton de la enspezataj kotizoj. (Ni supozu, ke temas tie ĉi pri la kvinono).

Ekzemple, en granda urbo, se la loka societo havas 5.000 anojn pagantaj po unu peseto (40 spesdekoj) monate, ĝi devas pagi al la regiona federacio 1.000 pesetojn (400 spesmilojn) ĉiumonate, kaj el tiu ĉi sumo la regiona devos pagi al la nacia 200 pesetojn (80 Sm.) ĉiumonate, kaj tiu ĉi lasta asocio devos pagi al la universala 40 pesetojn (16 Sm.) el tiu sumo, t. e., 480 ptojn. (192 Sm.) jare. Anstataŭ la kvinono, povus esti elektataj aliaj frakcioj, kiuj montriĝus necesaj).

Tiamaniere, supozante, ke en la tuta mondo ekzistas 60 naciaj asocioj el landoj kun mezonombro da 5.000 esperantistoj kaj simpatiantoj ĉiu (enskribitaj en la lokaj societoj de la tuta lando), la universala organizaĵo, kun relative malgranda laboro, havus enspezon da 28.800 pesetoj (11.520 Sm.) jare. (Prenante kiel bazon la frakcion de la supra ekzemplo).

La esperantistoj individue nur devus pagi kotizon al kaj labori kun la loka societo. Tiamaniere la tasko estos unuecigita, kaj unu sama laboro ne estos farata multoble. Ne estos elspezita tiom da mono por sendelspezoj (mandatoj), afranko, ricevelspezoj (leteristo, poŝtmandatisto), k. t. p.

Por tio: La societoj kaj societaroj devus havi inter si kuran konton. Oni devus uzi por la prezomontroj nur unu internacian monon, nome, la Spesmilon, kiu faciligos kaj simpligos la aferojn de transpago. (Antaŭ la milito la Spesmilo montriĝis tre utila, kaj nun kun la normaligo de la valutoj, povus esti tre facile enkondukita).

Servoj.

La *loka societo* devas havi bibliotekon por legado kaj konsulto en la societa loko kaj hejme (sub certaj kondiĉoj). Fari kursojn en la loko kaj per korespondado. Vendi librojn, insignojn kaj aliajn esperantaĵojn kaj abonigi al la esperantistaj gazetoj. Havi plenan adresaron de la lokaj esperantistoj (membroj aŭ ne) kaj simpatiantoj membroj. Disdoni al la societanoj

ĉiumonate ĉe kotizenspezo la gazeton eldonata de la nacia asocio aŭ konfederacio. Arangi propagandajn paroladojn, kunlabori kun la gazetaro por la regula enpresigo de propagandaj artikoloj kaj notoj, organizi festojn, ekskursojn, instruajn vizitojn, kaj krei la fakojn, kiuj montriĝos necesaj aŭ sukceseblaj laŭ la nombro da societanoj (reciprokmonhelpa (montepio), sporta, fotografia, stenografia, filatela, kooperativa, teatra, ekskursista, instrua, k. t. p.), kaj ankaŭ unuigi profesie la esperantistoj laŭ fakoj (studenta, komerca, jurista, kuracista, k. t. p.) Organizi ekzamenojn (akorde kun la nacia societo) kaj doni diplomojn pri kapableco kaj profesoreco.

Ĉiu loka societo devas sisteme kaj konstante zorgi pri la varbado de novaj membroj, per cirkuleroj, afiŝoj, vizitoj, ĵurnalaro, radio).

La *regiona societaro* (federacio) zorgu pri la formado, konservado kaj rilatigado de la lokaj societoj kaj grupoj. Ĝi havu provizon da libroj kaj esperantaĵoj por servi la bezonoj de la lokaj organizoj.

La *nacia federaciaro* (konfederacio aŭ asocio) helpu al la kreado, fortigado, konservado kaj rilatigado de la regionaj federacioj. Ĝi havu ankaŭ provizon da libroj por servi al la regionaj societaroj kaj eldonu monatan gazeton en la nacia lingvo kaj Esperanto. (La propagandaj artikoloj en nacia lingvo, kaj la organizaj kaj literaturaj en Esperanto).

Kaj fine, la *universala organizaĵo* U. E. A., k. t. p.) zorgu pri la formado, konservo, progresigo kaj rilatigado de la naciaj organizaĵoj, provizu ilin per esperantaĵoj (libroj, insignoj, propagandaj markoj, flagoj, k. t. p.), informoj. Eldonu monatan gazeton tute en Esperanto. Kunhelpu al la organizado de la Universalaj Kongresoj, eldonu ĉiujare liston aŭ jarlibron kun la adresoj de la naciaj, regionaj kaj lokaj societoj kaj grupoj de la tuta mondo kaj de izolaj esperantistoj en la lokoj, kie ankoraŭ ne povis esti formata grupo (La aliaj fakoj agu laŭ la celo, kiun montras ilia nomo: I. C. K., C. O., K. R., L. K., k. t. p.).

Tiuj estas la servoj farataj jam de la Universala Esperanto-Asocio; la diferenco konsistas je la administrado, ĉar anstataŭ havi, kiel nun, la necertan kaj karan enspezon rekte de la individuoj, ĝi ricevos pli certan enspezon de la naciaj societoj, pere de la laŭgrada organizaĵaro, kiu per la enspezistoj kaj varban-

toj de la lokaj societoj, faciligos kaj pligrandigos la enspezojn. Tiu tasko ne povas esti efike farata nur de la nunaj delegitoj de U. E. A., ĉar ili estas honoraj nepagataj oficantoj, kiuj ne havas la allogan varbrimedon, kiun grava loka societo prezentas, kaj al kiuj ne povas esti postulata konstanta laborego, ĉar ili havas siajn urgajn okupojn ankaŭ ekster la Esperanto-movado aŭ por gajni la vivrimedojn devas labori en aliaj aferoj krom Esperanto.

Ni ne parolas tie ĉi pri la projektita Esperanto-tagĵurnalo (nun semajna Heroldo de Esperanto), ĉar la realigo de tiu ĉi bela plano, kiel de multaj aliaj—scienca verkaro, k. t. p.—estas la konsekvenco de la forta kaj intensa movado, kiun nia projekto de organizado celas krei).

III.—IO PRI REGULAROJ

La regularoj, krom en tiu aŭ alia punkto aŭ detalo, ĉiuj estas bonaj kaj akcepteblaj (en tio, kio ne malhelpas la tradician neŭtralecon de Esperanto kaj ĝiajn naturevoluajn principojn difinitajn de D-ro Zamenhof kaj de la Oficialaj Institucioj de Esperanto), kaj ĉar la organismoj devas esti memstaraj por la plej bona disvolvigado sia nur devus esti ŝanĝata la parto de la regularo pritraktanta la formon akiri la vivrimedojn (enspezoj) kaj estigi la interrilatojn de la diverskategoriaj asocioj, aldonante la devon pagi ĉiujare (aŭ ĉiuperiode) la koncernan subvencion al la plejproksima supera organismo.

Neniu surpriziĝu, do, ke ni ĉi tie ne redaktas detalan regularon, sed, sekvante la kondiĉojn de la Konkurso, prezentas ĉion necesan por formi tiun regularon, kaj eĉ ĝian ĉefan parton en artikolita formo.

Regularoj pritraktas la celon de la asocio kaj la manieron ĝin atingi. La celo estu ĉiam diskonigi, instrui, ekzerci, praktike uzi kaj uzigi la lingvon en ĉiuj rilatoj internaciaj aŭ diverslingvanaj (instruante la lingvon oni konigas la internan ideon de Esperantismo); kaj la plej taŭga maniero atingi tiun celon estas difinita en tiu ĉi projekto de organizado.

Ekzistas aĵo, tamen, kiun la regularoj ne povas ordoni, kvankam ĝi estas la plej grava por progresigi la societon: ĝi estas alta grado de entuziasmo kaj fido en Esperanto kaj en la socie-

to; nur tio «donacas la bonon al nia laboro kaj la forton al nia fervoro», pri kiuj nia Majstro Zamenhof en sia «Preĝo sub la Verda Standardo» petegis. Kaj memoru ni, ke tiuj fido kaj entuziasmo nur povas esti konservataj ĉe la sukceso, ĉar kiam homo malsukcesadas li iĝas plejofte nemorala kaj malvigla. Tial la ĝenerala aprobo kaj efektivigo de la bona organizo ĉi tie projektata helpu krei la sukcesadon, per kiu oni estas atingonta tiun viglecon kaj fervoron, nealtrudeblaj de la regularo.

Inter aliaj aferoj, la regularoj priskribas la devojn de la estraro, personaro kaj membroj, sed sufiĉas, ke ili limigu sin plenumi nur sole sian devon, por ke la efiko de la societo restu preskaŭ nula. Oni, do, plenumu pli, ol nur sian devon.

Alia grava afero, kiun la regularo ne povas postuli, estas la nombro da pagantaj membroj, kiun la societo havu, kaj tiu grava afero estas lasata al la entuziasmo de la estraro kaj membroj serĉi novajn societanojn. Tio estas ofte rekomendata, sed atentata neofte. Kaj la plejmulto da homoj necesas esti varbataj por aniĝi. Krom tio, se la anoj devas iri al la societo por pagi siajn kotizojn, multaj ne iras, kaj la forpaso de tempo eksigas ilin. Pro tio ni venis al la gravega konkludo, ke *nia organizo baza, la loka societo, devas havi nepre proporcie pagatajn varbantojn-enspezistojn*, kiel havas ilin ekzemple reciprokmonhelpaj societoj (montepioj) kaj aliaj neesperantistaj asocioj.

La rekte kaj konstante laboranta personaro de ĉiu konvene starigita societo estas la diletanta (estraro) kaj la profesia (komizaro); la manko de unu aŭ alia estas difekto seniganta la societon aŭ asocion je la eblo forte kaj konstante grandiĝi kaj progresadi. Pro tio la ekzisto de komizaro devas esti fiksita de la regularo, por dungi ĝin laŭgrade tuj kiam estas eble.

Pri la detaloj de la praktika maniero akiri kaj disdoni la ricevatan kunhelpon (precipe de la lokaj societoj), detaloj en la nuna tempo ne menciataj en la regularoj, estas donataj tie ĉi la necesaj klarigoj, kaj estus utile, ke tiuj gravaj detaloj, por ne forgesigi pro la natura alternado de la estraroj kaj membroj, estu fiksitaj skribe, kio povus konsistigi internan regularon de la societoj. La aliaj informoj donataj tie ĉi pri la funkciado, devoj kaj rajtoj de la respektivaj asocioj, kreas per si mem la ĉefan parton de ties regularoj.

Artikolita formo.

Tamen, por plenplene akordiĝi kun la temo, ni resumas sekve en kelkaj artikoloj la ĉefajn ideojn de la projekto (aplikeblaj al la lokaj, regionaj naciaj kaj universala organizaĵoj):

1) La nomo de la societo (federacio, k. t. p.) estas..... (Tiamaniere oni lasas la memnomecon (aŭtonomecon), kiel ĝis nun. Estus preferinde celi havi en ĉiu urbo aŭ vilaĝo nur unu societon aŭ grupon. En grandaj urboj povus ekzisti centra societo kaj filioj por la apartigitaj kvartaloj. Ne gravas, ke tiuj filioj konservu diversajn malsamajn nomojn kaj havu eĉ estraron, sed por praktike utiligi la fortojn, tiuj filioj devas dependi de la centra societo kaj agi laŭ ties plano.)

2) La (centra) loko de la societo estas..... Tiu de ĝiaj filioj estas..... (Por la grandaj urboj). *Vidu suba noto* (1).

3) La celoj de la loka societo estas: a) la propagando de Esperanto; b) ĝia instruado, kaj la disvastigo de ĝia uzado kiel helpa, internacia lingvo (en literaturo, scienco, komerco, k. t. p.)

3) La celo de regiona federacio estos la fondo, konservado, fortigado kaj rilatigo de la lokaj societoj kaj grupoj. Ĝia ĉefa tasko estos la korespondado kaj vizitado de urboj kaj vilaĝoj kaj aranĝo de regionaj kongresoj. Ĝi ne bezonos enspeziston, ĉar ĝiaj enspezoj venos rekte nur de la societoj kaj grupoj lokaj).

3) La celo de nacia asocio aŭ konfederacio estos la fondo, konservado kaj rilatigado de la regionaj societaroj aŭ federacioj, estante ĝiaj rajtoj, devoj kaj rilatoj koncerne la federaciojn, similaj, kiel tiuj de la federacioj rilate al la lokaj societoj kaj grupoj. Ĝi organizos la naciajn kongresojn peros fervojrabojn, kaj estos en rilato kun la registaro por atingi oficialan apogon (dekretojn, subvenciojn, oficiala enkonduko de Esperanto en la lernejojn, k. t. p.) (Pri privata enkonduko zorgos lokaj societoj).

3) La celo de la universala asocio aŭ organizaĵo estos zorgi

(1) La adreso de la loka societo povus esti la sama, kiel tiu de la federacio, nacia aŭ universala asocio, kaj ankaŭ la komizaro de unu povus helpi al la alia (pagante la federacio aŭ asocio la koncernan parton de la elspezoj de lokluo kaj personaro). Tiel oni malgrandigus la elspezojn.

pri la formado, konservado, plifortigado kaj rilatigado de la naciaj asocioj (unu en ĉiu nacio). Ĝi kunhelpu ankaŭ al la preparo de la universalaj kongresoj.

Por la diverskategoriaj asocioj vidu ankaŭ ĉapitr. II, subdivid. «Servoj».

IV.—POSTRIMARKOJ

Tiu sistemo de organizo neniel povas malhelpi la iniciativojn de la individuoj aŭ societoj, ĉar paginte la kotizon kaj plenuminte siajn devojn, ĉiu rajtas fari tion, kio montriĝas plej bona por la progreso de Esperanto; tio necesa estas la plej granda unueco, por ke la fortoj ne estu malŝparataj kaj la laboroj farataj multoble.

La gazeto kaj adresaro de U. E. A. estos sendataj al ĉiuj asocioj kaj grupoj. Ankaŭ la esperantistoj povus aboni ilin pere de la grupoj, kiuj, ricevante ilin are, disdonus ilin profitante la vizitojn de la enspezisto.

Izolaj esperantistoj povas enskribiĝi en la plej proksima grupo, ĝis kiam ili sukcesos krei grupon en sia vilaĝo.

Ĉar la ĝenerala tendenco de la mono estas senvaloriĝi iom post iom, pro la altigo de la prezoj, la kotizoj (kiel abonoj, libroj, k. t. p.) estos altigeblaj, kiam montriĝos necese, por tio, ke ilia valoro restu praktike la sama kompare al la valoro de produktoj kaj servoj. Por faciligi tiun aranĝon, oni povus uzi la ŝtatajn statistikojn, kiuj montras la tiel nomatan «indekson de la prezoj».

V.—KONKLUDOJ

1-a. Praktike ĉiuj Esperantistoj estos pagantaj membroj de U. E. A.


2-a. Ĉiuj grupoj, societoj k. t. p., ne perdante sian memstaron, estos kvazaŭ filioj de la universala organizaĵo (U. E. A., I. C. K., k. c.), kaj

3-a. La universala organizaĵo (U. E. A., k. c.) ne havos tiom da laboro kaj, konsekvence, ĝiaj elspezoj estos malpli grandaj, kvankam ĝiaj enspezoj estos pli certaj kaj grandigitaj. Ĝi, do, multe povos entrepreni kaj konduki nin, la Tutmondan Esperantistaron (se ni respektas ĉiam la «Fundamenton de Esperan-

to», la Lingvan Komitato kaj ĝian Akademion) al pli facila kaj pli rapida triumfo de nia nobla idealo.

La 23-an de Aprilo 1929.

Verko premiita en la Unua Literatura Konkurso de la Hispana Esperanto-Asocio. Seviljo, 5-9 Novembro 1928. Aŭtoro: Jozefo Anglada Prior, strato Sitjas, 8, 3.^o, 1-a, Barcelono (Hispanujo).



VIII^a KONGRESO DE ESPERANTO EN OVIEDO (Asturias) de la 14^a ĝis la 18^a de septembro de 1929^a

Ĉio antaŭvidigas gravegan sukceson, ĉar entuziasmege senlace kaj ĉiel helpas la laboron de la LKK. la juna divizia ĝeneralo Zubillaga, nuntempe Provincestra Moŝto de Oviedo, kiu tute perfekte konsciis la gravecon de Esperanto, kaj tial efike li agadas kaj agis por ke la provinca Oficejo por Turismo estu nominta S-ron Jimenez Mora, Prezidanto de la Asturia Esperanto-Federacio kaj de LKK, VOĈDONANTO. Dezirinde estas, ke la hispanaj kaj fremdaj samideanoj sin turnu al la ĝeneralo per dankesprimanta ilustrita poŝtkarto vidiganta al li sian dankemon pro lia helpo, kaj vi atentu, ke tiu poŝtkarta manifestacio de la tuta esperantista mondo pli kaj pli kuraĝigos lin. Ne prokrastu alsendon de la poŝtkarto, ĉar sufiĉas adresi ĝin al li laŭ dirite.

La malfermo estos solenega kaj ĉeestata de ĉiuj aŭtoritatoj, la fermo same solenega en la apuda gravega urbo Gijón (Hiĥon), kies urbestro estas malnova esperantisto promesinta sin turni esperante al la Kongresanaro je tiu okazo. La Deputataro kaj la Urbeŝtraro de Oviedo solene akceptos la Kongresanaron kaj ĉi tiun la unuaĵon per abunda bongusta lunĉo.

Okazos solena meso kantata kaj ludata de bonega Kapelorkestro, kun esperanta prediko de pastro Cristobal Fournier.

La fama meritplena Orfeon Ovetense (Ovieda Ĥoraro) orga-

nizas grandiozan muzikfeston en ĉefa teatro por aŭdigi regionajn popolkantojn kaj esperantajn himnojn laŭ centvoĉa horo kaj laŭ soloj ĉiam akompanate de tre kompleta kaj sperta orkestro.

Estos miriganta ekskurso tra la ravanta asturia kamparo por ĝui la belajn pejzaĝojn kaj rimarkindajn monumentojn kaj historiajn lokojn, dum kiu la ekskursantoj ankaŭ vizitos la faman fabrikon de pomvino (Sidra) «El Gaitero», (La Flutisto), en kiu ĉiuj gustumos laŭ plaĉo la kvazaŭ djan nektaron kaj ricevos belajn propagandilojn kiuj refreŝigos la agrablegan gustumadon. La ekskurso kostos nur DUDEK PESETOJN.

Des pli ravanta estos la pilgrimekskurso al Noreña, ĉar la samideanoj ĝuos unu el plej tipaj festoj de Asturias kaj estos akceptataj de belegaj fraŭlinoj de Noreña tipe vestitaj kaj parolantaj nian lingvon, kaj certe neniu kongresano forgesos la senpagan ekskurson ne pro ĉi tio, sed pro la allogo de la festo, de la akcepto kaj de la ĉarmo de la loko kaj de la samideaninoj de Noreña.

Ni, la hispanoj jam organizas niajn Kongresojn por ke ili postlasu ion gravan, kiu estu ĉiamdaŭra kaj influanta, de kiam ni trafis starigi firme la tutlandan Asocion, kiu estas sekvo de laborplenaj unuaj Kongresoj de Barcelono, Zaragozo, Valencio, Bilbao kaj Kordobo; de la Madrida Kongreso restas praktike nia progresadanta simpla Asocio kaj belega filmo esperanta: de tiu de Seviljo restas kiel sekvo de ĝia Internacia Literatura Konkurso, la plej grava iniciativo pri plej simpla tutmonda esperanto-organizo, kies aŭtoro estas ankaŭ hispano, kaj ankaŭ restas la gravaj diroj de nia kara prezidanto de la Esperanto-Akademio pri la persistado tute pura de la Esperantismo de la unuaj tempoj, de la Esperantismo de Zamenhof, en nia lando; de tiu de Oviedo restos grandioza esperanta filmo, kaj du gravaj iniciativoj: Konkurso de tipe regione aŭ nacia vestitaj pupoj, laŭ la jenaj kondiĉoj:

I.—La pupoj estos sendataj pare vir-kaj virinvestitaj laŭ tipaj kostumoj de regionoj aŭ landoj.

II.—La pupoj estos 40-centimetre altaj minimume.

III.—Akompanos la pupojn kompletajn klarigojn pri la kostumoj kaj kompletan noton pri la sendinto.

IV. — La pupoj devos trafi la LKK antaŭ la 12 de septembro de ĉi tiu jaro (1929).

V. — Almenaŭ estos TRI monpremioj por la tri plej belaj paroj.

VI. — La elspezoj pro livero de la pupoj al la LKK estos pagotaj de Sendinto.

VII. — Senditaĵo ne plenumanta la kondiĉojn estos konsiderata ekster la konkurso.

KLARIGOJ. — La puparo formas ekspozicion dum la Kongreso, kaj poste la LKK transdonos la puparon al tombolo por Bomfaremo al geinfanoj. Oni celas gravajn premiojn, kaj certe oni trafos ilin. Interesito sin turnu al la LKK, petante hispanan banderolon por faciligi la alsendon kaj ricevon de la pupoj.

La dua iniciativo, kiu restados ĉiamdaŭre influanta kaj grave estas Internacia Ekspozicio el laboritaĵoj faritaj de geinfanoj en Lernejoj (desegnoj, pentraĵoj, ĉizaĵoj, ĉarpentaĵoj, kudritaĵoj, brodaĵoj, flikaĵoj, skribaĵoj, kalkulaĵoj, kantaĵoj, k. t. p., kaj du poŝtkartoj de la instruistoj, kun klarigoj kaj opinioj pri instruado de Esperanto en la Lernejoj, unu; kaj; la alia poŝtkarto kun opinioj pri plej bona metodo por instruado de geinfanoj en la nuntempo. Por ĉi tiu Ekspozicio ankaŭ oni difinos mompremiojn kun disdonado de gravaj altvaloraj libroj donacitaj tiacele de la Hispana Ministro de Publika Instruado. Oni premios la lernejon sendintan plej kompletan kaj altvaloran materialon, kaj estas invitataj naciaj kaj fremdaj geinstruistoj sendi la materialon, ĉar amase ili devas partopreni la Ekspozicion, kiu efike influos la hispanan ministran Moŝton, la hispanajn geinstruistojn kaj la publikon, al nia afero. Espereble estas, do, ke ĉiuj konsciu pri la graveco de ĉi tiu Ekspozicio, kaj naciaj gacetoj estas petataj paroli pri la du iniciativoj speciale pri la lasta.

Aliĝu tuj al la Kongreso por ĝui la magian regionon de Asturias kun mirigantaj grandiozaj pejzaĝoj, kun fruktodonaj kamparoj, kun majeste imponaj montoj kaj belegaj marbordoj, kun artplenaj malnovaj arkitekturaĵoj. De la Rigardejo de Fito la panoramo estas nepriskribebla, ĉi tiu entenas grandiozajn vastajn perspektivojn de CAMPO DE CASO al la Ekstrema limo orienta kun la tutmondfamaj Pintoj de Eŭropo, kun la montaro de VILLAVICIOSA al SAN ANTOLIN DE BEDON. Oni nomas la Rigardejon de Fito «Observatorio de la Mirin-



daĵo», kaj, jen, iuj opinioj de eminentaj verkistoj pri ĝi: «La Rigardejo de Fito estas la rozo de l'ventoj en Asturias. Tie la agloj kaj la uraganoj konscios pri sia direkto»; «La Rigardejo estas peco el la ŝtuparo al ĉielo, ĝi entenas iujn ŝtupojn; sed samajn ŝtupojn ne havas alia terpeco»; «Predikejo por sin turni al grandioza kunveno el genuiĝintaj montoj»; «Observejo de Eŭropo ĉe la loko kie kruciĝas ĉiuj ventoj. Rigardejo lasta de ĝia plej alta masto»; «La Rigardejo de Fito kvazaŭ tremetas supren de la abismo pligrandigante la emocion. Ĝi estas kvazaŭ signalo atentanta admiru la intiman asturan belecon». «Ĝi estas alteniganta brako tenanta pokalon por tosti je belega spirita stonteco, kiun ĉirkaŭas montoj kaj montaroj eksterordinare grandiozaj kaj belegaj». «Ĝi estas balkono al la maro, al la montaro... kaj al la ĉielo senlima de tiu altaĵego». Aliĝu senpkroraste por ebrigi je plezuro, por fariĝi kvazaŭ loĝanto de vere tera paradizo. Sendu viajn kotizojn: 5 pesetojn la hispanoj, 6 svisajn frankojn la fremduloj kun rajto ĉi tiuj ricevi senpage dum la tuta jaro la gazeton «Hispana Esperanto».

Atentu bone: ke kompleta pensio estos de SES en pli ol DUDEK pesetojn, laŭplaĉe; ke estos triono da rabato por la fervojbiletoj, pro kio fremduloj povos iri de Irun al Oviedo kaj reveni proksimume po 51,80 pesetoj en II^a klaso, kaj po 37,76 pesetoj en III^a klaso. La fremduloj povos viziti San Sebastián, Bilbao, Santander kaj la tutmondfaman Groton de Altamira. Adreso: Komitato de la VIII^a Hispana Kongreso de Esperanto. Ateneo Popular. — Oviedo.

Aliĝintoj al la Kongreso.

1. — S-ino Escolástica Herrero. Oviedo.
2. — S-ro Antonio Jiménez Mora, Infanteria Kapitano. Idem.
3. — » Francisco Rojo Cortés, Komercisto. Idem.
4. — » Luis García Fernández, Oficisto. Idem.
5. — » Mario García Fernández, Idem. Idem.
6. — » Emilio Peñarroya, Horlogisto. Idem.
7. — » Manuel Maynar Barnólas, Advokato. Zaragoza.
8. — F-ino Sara Maynar, Studentino. Idem.
9. — » Yrma Maynar, Idem. Idem.
10. — S-ro Mariano Mojado Abad, Pastro. Madrid.


KANTO DE ASTURIAS

Asturias, kore kun varmo,
Montara lando amata;
Mi ĉiam restu kun ĉarmo
Ĉe ĝi pro sent' delikata!

En monton jen suprenrampo;
Estos ja por ŝi la flor'
Plej bela de ĝia kampo,
Estu ĝi sur ŝia kor'!

Estu ĝi sur ŝia kor,'
Ĉu ne floron ŝatos ŝi,
De la monto floro for,
Ĉar ĝin nepre prenos mi!

Tradukis J. M. R., kiu donis pli grandan realecon al la pasia sento, esprimante meti la floron sur la koro.



GUSTAVO A. BECQUER †

(NEPUBLIKIGITA VERSAĴO)

La vivo estas revo,
Sed estas febra, kvazaŭ fulmolumo;
Ĉar kiam vi vekigas,
Jen: ĝi nur estas, ho vel, vanto, fumo...

Mi volus estu revo
Tre longa kun profundo;
Daŭranta revo ĝis min trafu morto!...
Kaj mi ŝin mia revus ĉe l' korfundo.

